

*La Libroj de la
Esperanta Biblioteko Internacia
estas riceveblaj en:*

Berlin de Esperanto Verlag Möller & Borel, Lindenstrasse 18/19.

Paris de Hachette & Co., 79 Boulevard St. Germain.

London de British Esperanto Association, Museum Station Buildings 133-6,
High Holborn kaj Review of Reviews, Mowbray House, Norfolk street.

New York de Fleming H. Revell Comp, 158 Fifth Avenue.

Kjöbenhavn de Andr.-Fred Höst & Sön, Bregade 35.

Barcelona de Jaume Sales Balmes, Serra 13 pral.

Budapest de Lajos Kókai, Károly-Utca 1.

Livorno de R. Giusti, 53 Via Vittorio Emmanuele.

Warszawa de M. Arct, 53 Nowy Swiat.

Bucuresti de Libraria noua Carol P. Segal, Calea Victoriei 78.

Ĉiu libreto de la *Esperanta Biblioteko Internacia* kostas *unu spescenton* (0,10 Sm)=25 centimoj, 20 pfenigoj, 2½ pencoj, 5 cendoj, 24 heleroj, 10 kopekoj, 10 oeroj.

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

Tradukis
F. Skeel-Giörling.

No. 2.
Prezo 0,10 Sm.

Fabeloj de Andersen

I.



BERLIN.

Esperanto Verlag Möller & Borel

kaj korespondantoj en
Paris, London, New-York, Kjöbenhavn, Warszawa, Barcelona,
Budapest, Livorno, Bucuresti.

Al siaj du amataj Filetoj

Preben Skeel-Giörling

kaj

Erik Skeel-Giörling

sincere dediĉas ĉi-tiun tradukaĵon

La Verkinto.

3

Hans Christian Andersen.

Nia dana verkisto, el kies mondkonataj fabeloj ni havas la plezuron prezenti kelke da elektitaj tradukaĵoj en Esperanto, naskiĝis en la jaro 1805 en Odense (Danlando) kiel filo de malriĉa ŝuisto. Liaj infanaj kaj junulaj jaroj ne estis feliĉaj; la grandaj suferadoj kaj seniluziigoj, kiujn li travivis dum ĉi-tiu tempo, profunde impresis al lia kortuŝanta pia, sentema animo kaj poste stampis lian tutan produktadon. Dank' al la kunhelpo de kelkaj eminentaj viroj li povis fari klasikajn studojn en Kopenhago, kaj ankaŭ entrepreni longajn vojaĝojn en la eksterlandon, precipe Italujon.

El la plumo de H. C. Andersen troviĝas multe da belaj lirikaj poemoj kaj diversaj romanoj, sed plej alte lia talento kaj fantazio atingis en la "Fabeloj", kiuj estas tradukitaj en preskaŭ ĉiuj naciaj lingvoj. Pri la origino de l' fabeloj — jen seriozaj, jen satiraj kaj gajaj — li mem diras: "Mi kaptas ian ideon, kiu povas interesi la plenkreskulojn, kaj mi rakontas ĝin por la infanoj, tamen memorante ĉiam, ke la gepatroj ofte aŭskultas mian rakontadon, kaj al ili mi ja devas doni ion por pripensado."

H. C. Andersen mortis en Kopenhago en 1875, amata de sia samtempanaro kaj honorata de siaj admirantoj el la tuta mondo. Sian aŭtobiografion li lasis en la romano "Fabelo de mia vivo" (1855). Je la 70^a datreveno de lia naskiĝo estas eldonitaj tradukaĵoj en dek kvin lingvoj de lia bela fabelo "Rakonto pri patrino", kaj en la jaro

1905, okaze de la 100-jara festo aranĝita je memoro pri la naskiĝo de l' granda poeto, la urbestro de Odense fondis specialan Muzeon kie oni kolektis ĉion — librojn, verkojn, bildojn, tradukaĵojn, meblaron k. c. — kio havis signifon por la vivo de H. C. Andersen.

Kopenhago, Marto 1909.

Fr. Skeel-Giörling.

5

La brava stansoldato.

Estis iam dudek kvin stansoldatoj, ili ĉiuj estis fratoj, ĉar ili devenis de malnova stankulero. La pafilon ili tenis per la brako, la vizaĝo rigardis rekte antaŭen; ruĝa kaj blua, vere bela estis la uniformo. La unua parolo, kiun ili aŭdis en ĉi-tiu mondo, kiam estis forprenita la kovrilo de l' skatoleteto kie ili kuŝis, estis la vorto: Stansoldatoj! ĝin kriis knabeto kaj kunfrapis la manojn; li donace ricevis la soldatojn, ĉar estis lia naskiĝotago, kaj nun li starigis ilin sur la tablo. Ĉiuj soldatoj tute egale aspektis; nur unu iomete diferencis de l' aliaj; li havis unu solan piedon, ĉar li estis fandita laste, kaj tiam ne restis sufiĉe da stano; tamen li staris tiel firme sur unu piedo kiel la aliaj sur du, kaj estas precipe li, kiu fariĝis fama.

Sur la tablo, kie ili staris, troviĝis multe da diversaj ludiloj, sed la plej rimarkinda estis bela palaco el papero. Tra la fenestretoj oni povis rigardi en la salonojn. Ekstere kreskis arboj ĉirkaŭ speguleto, kiu reprezentis lagon; ĉirkaŭ el vakso naĝis sur ĝi kaj sin spegulis. Ĉio estis ĉarma, sed la plej ĉarma tamen estis fraŭlineto, kiu staris en la malfermita pordo de l' palaco; ankaŭ ŝi estis farita el papero, sed ŝi havis belan jupeton el la plej hela stamino kaj bluan rubandeton kiel mantelon ĉirkaŭ la ŝultroj; meze de l' mantelo estis alkudrita brilanta ora perlo, kiu estis tiel granda kiel ŝia vizaĝo. La fraŭlineto etendis siajn brakojn supren, ĉar ŝi estis dancistino, kaj unu piedon ŝi tiel alten levis, ke la stansoldato ne povis ĝin trovi kaj kredis, ke ŝi havas nur unu piedon kiel li.

"Certe, ŝi estus vera edzino por mi!" pensis la stansoldato, "sed ŝi estas tre nobla, ŝi loĝas en palaco, mi havas nur skatoleton, kaj en ĝi ni estas jam dudek kvin, ne estas deca loko por ŝi! tamen, mi deziras konatiĝi kun ŝi!" kaj jen li sin kuŝigis, tute longa kiel li estis, post flartabakujo, kiu staris sur la tablo; de tie li povis bone rigardi la noblan fraŭlineton, kiu senĉese staradis sur unu piedo sen malekvilibriĝi.

Kiam fariĝis vespero, oni metis la ceterajn stansoldatojn en la skatoleton, kaj la loĝantoj de l' domo kuŝigis por dormi. Tuj la ludiloj komencis ludi, ricevi gastojn, fari

militon kaj 7aranĝi balon; la stansoldatoj kraketis en la skatoleteto, ĉar ili volis ludi kun la aliaj, sed ili ne povis forpreni la kovrilon. La nuksrompilo faris renversojn, kaj la grifelo petoladis sur la tabulo; estis tiom da bruego, ke la kanario vekiĝis kaj komencis interbabili, kaj tion ĝi faris eĉ verse. La solaj du kiuj tute ne moviĝis el sia loko, estis la stansoldato kaj la dancistino; ŝi staris tiel rekte sur la piedpintoj, kun ambaŭ brakoj etenditaj, kaj li restis egale firma sur unu piedo; eĉ unu momenton li ne ĉesis ŝin rigardi.

Nun, el la horloĝo sonoris la dek-dua, kaj klask! jen malfermiĝis la kovrilo de la flartabakujo, sed ne estis flartabako en ĝi, tute ne, sed nigra koboldo; ĉi-tio estis amuzaĵo.

"Stansoldato!" diris la koboldo; "gardu viajn okulojn, ne uzu ilin tiom!" Sed la stansoldato ŝajnis, kvazaŭ li nenion aŭdus.

"Nu, atendu nur ĝis morgaŭ!" diris la koboldo.

Kiam fariĝis mateno kaj la infanoj leviĝis el lito, la stansoldato estis metita sur la fenestrobreton, kaj ĉu estis la koboldo aŭ trablovo, oni tion ne scias, sed subite la fenestro malfermiĝis kaj la soldato renverse elfalis de la tria etaĝo. Estis terura rapideco, li tenis la piedon rekte 8supren kaj staris sur la ĉapo kun la bajoneto inter la pavimŝtonoj.

La servistino kaj la knabeto tuj venis por serĉi lin; sed kvankam ili preskaŭ marŝis sur li, ili tamen ne rimarkis lin. Se la stansoldato estus kriinta: jen mi estas! ili certe lin estus trovintaj, sed ne ŝajnis al li dece tiel laŭte krei, ĉar li portas uniformon.

Baldaŭ komencis plui, la gutoj falis pli kaj pli dense, kvazaŭ rivere; kiam finiĝis la pluvego, alvenis du stratbuboj.

"Rigardu!" diris unu, "jen kuŝas stansoldato! Li devas ŝipveturi!" Kaj el malnova gazeto ili faris ŝipeton, starigis en ĝi la stansoldaton, kaj jen li navigis tra la pluvakvo de l' defluejo; la du knaboj flanke kuris kaj kunfrapis la manojn! Granda Dio! kiaj ondoj en tiu defluejo! kaj kia fluo! certe, sed ja pluvegas! La paperŝipeto forte balanciĝis, kaj kelkafoje ĝi tute kliniĝis, tiel ke la stansoldato estis skuegita, sed li restis firma, ne ŝanĝis la mienon, rigardis rekte antaŭen kaj tenis la pafilon per la brako.

Subite la ŝipeto ennaĝis sub longan piedbreton de ia defluejo, kie fariĝis tiel mallume kvazaŭ li estus en sia skatoleteto.

"Kien do nun mi alvenas?" li pensis; "certe, ĉi-tio estas la kulpo de l' koboldo! Ho, se nur 9la fraŭlineto estus ĉi-tie en la ŝipeto, tiam sen malagrablaĵo povus esti trifoj pli mallume!"

En la sama momento venis granda rato, kiu loĝis sub la breto.

"Ĉu vi havas pasporton?" demandis la rato, "montru la pasporton!"

Sed la stansoldato restis silenta kaj tenis pli firme la pafilon. La ŝipeto rapidege forrapidis kaj post ĝi kuregis la rato. Hu! kiel ĝi grincigis la dentojn, kaj ĝi kriis al bastonetoj kaj pajlo:

"Haltigu lin! Haltigu lin! Li ne pagis dogan-imposton! Li ne montris pasporton!"

Sed la fluo fariĝis pli kaj pli forta, la stansoldato jam povis vidi la helan lumon antaŭe, kie finiĝis la breto, sed li ankaŭ aŭdis sonon de muĝado kiu tre bone povus timigi bravulon; imagu nur: kie finiĝis la breto, la pluvakvo elverŝiĝis en grandan kanalon, tio estis al li same danĝera, kiel estus al ni veturi tra granda akvofalo.

Li nun jam tiel alproksimiĝis, ke li ne povis haltiĝi. La ŝipeto elsaltis, la stansoldato sin tenis tiel rigida kiel li povis; neniuj povus diri pri li, ke li eĉ palpebrumas. Tri aŭ kvarfoje la ŝipeto renversiĝis kaj ĝi estis plena je 10akvo ĝis la rando; ĝi nepre devis subakviĝi; jam l' akvo atingis la kolon de l' soldato, pli kaj pli profunde la ŝipeto subiĝis, kaj la papero sin disvolvis. Nun la akvo leviĝis ĝis super la kapo de l' soldato; tiam li pensis pri la ĉarma dancistino, kiun neniam plu li revidos, kaj en la oreloj de l' stansoldato sonoris la verseto:

For, for, soldato!
For al la morto!

Nun la papero disŝiriĝis, kaj la stansoldato trafalis, — sed tuj granda fiŝo lin englutis.

Ho! kia mallumo interne! Estis multe pli malbone ol sub la breto de l' defluejo, kaj tiel malvaste! sed la stansoldato restis firma, kaj li kuŝis tie kun la pafilo en la brako. —

La fiŝo ĉirkaŭe naĝis, movante sin plej terure; fine ĝi fariĝis tute senmova, ekbrilo kvazaŭ fulmo ĝin trakuris, jen brilis tute hele kaj iu laŭte kriis: "Stansoldato!" La fiŝo estis kaptita, sendita al la vendejo, vendita kaj portita al kuirejo, kie la servistino ĝin distranĉis per granda tranĉilo. Per du fingroj ŝi prenis la soldaton ĉirkaŭ la korpo kaj portis lin en la ĉambron, kie ĉiuj volis vidi tian mirindan personon, kiu vojaĝis en la stomako de fiŝo; sed 11la stansoldato estis tute ne fiera. Ili starigis lin sur la tablo, kaj tie — vidu, kiel mirindaj aferoj povas okazi en la mondo — la soldato troviĝis en la

sama ĉambro, kie li antaŭe estis, li vidis la samajn infanojn, kaj la ludiloj staris sur la tablo, la bela palaco kun la ĉarma dancistino; ŝi staris ankoraŭ sur unu piedo, kaj tenis la alian alte en l' aero, ankaŭ ŝi estis firma; tio kortuŝis la stansoldaton, li volonte estus plorinta stanlarmojn, sed tio ne decus al li. Li rigardis ŝin, kaj ŝi rigardis lin, sed ili diris nenion.

Sed subite unu el la knabetoj ĵetis la stansoldaton en la fornĉon, eĉ sen diri la kaŭzon; sendube la koboldo en la skatoletĉo estis kulpa pri ĉi-tio.

La stansoldato staris hele lumigita, kaj li sentis teruran varmegon, sed ĉu ĝi devenis de la fajro aŭ de amo li ne sciis. La kolorojn li tute perdis; neniu povus diri, ĉu tio okazis dum la vojaĝo aŭ pro doloro. Li rigardis la fraŭlineton, ŝi rigardis lin, kaj li sentis, ke li fandiĝas; tamen ankoraŭ li restis firma kun la pafilo en la brako. Tiam ia pordo malfermiĝis, la vento forblovis la dancistinon, kaj senpeze kiel elfino ŝi flugis en la fornĉon al la stansoldato, 12ekflamiĝis kaj malaperis; tuj la stansoldato fandiĝis kaj fariĝis buleto, kaj kiam la sekvantan tagon la servistino elprenis la cindron, ŝi retrovis lin en formo de stankoreto; sed el la dancistino restis nur la ora perlo, kaj ĝi fariĝis tute nigra en la flamoj.

13

Rakonto pri patrino.

Patrino sidis ĉe sia infaneto, ŝi estis tiel malĝoja, ŝi tiom timis, ke ĝi mortos. La infaneto estis pala, ĝiaj okuletoj malfermiĝis; nur malforte ĝi spiris, kaj kelkafoje profunde kvazaŭ ekĝemante; kaj ankoraŭ pli malĝoje la patrino rigardis sian karuleton.

Jen iu frapis la pordon, kaj venis malriĉa, grandaĝa viro, envolvita en ĉevala kovrilo, ĉar ĝi varmigas, kaj tion li bezonis; estis ja malvarma vintro; ĉio ekstere estis kovrita je glacio kaj neĝo, kaj la vento akre blovis tiel ke la vizaĝo doloris.

Ĉar la viro tremis pro malvarmo, kaj la infaneto momenton dormis, la patrino verŝis bieron en kruĉon kaj ŝi metis ĝin en la fornĉon por ĝin varmigi por li; sed la viro lulis la infaneton, kaj la patrino sidiĝis sur seĝon apud li, rigardante la malsanan infaneton, kiu tiel profunde spiris, kaj ŝi levis la maneton.

"Ĉu ne ankaŭ vi kredas, ke mi lin konservas?" ŝi diris, "Dio ne forprenos lin de mi!"

14

Kaj la viro — kiu estis la Morto mem — strange balancis la kapon, kaj tio povus signifi jes aŭ ne egale. La patrino malsupren rigardis, kaj la larmoj fluis sur ŝiaj vangoj; — ŝia kapo fariĝis tiel peza! Tri noktojn kaj tri tagojn ŝi ne fermis la okulojn, kaj nun ŝi ekdormis, sed nur unu momenton, tiam ŝi subite suprensaltis, tremante pro malvarmo. Kio estas tio! ŝi kriis rigardante ĉirkaŭ si, sed la viro estis for, ŝia infaneto malaperis, li estis ĝin preninta kun si, kaj en la angulo de la ĉambro senĉese la radaro de l' antikva horloĝo zumante turniĝis, la granda plumbopezilo subiris rekte ĝis la planko, bum! kaj jen ankaŭ la horloĝo ĉesis funkcii.

Sed la malfeliĉa patrino forkuris el la domo kaj vokis sian infaneton.

Ekstere, meze de l' neĝamasoj, sidis virino en longa, nigra vestaĵo, kaj ŝi diris: "La Morto estis en via ĉambro; mi vidis, ke ĝi rapidege forkuris kun via infaneto; ĝi iras pli rapide ol la vento; ĝi neniam reportos kion ĝi prenis!"

"Diru nur, kiun vojon ĝi iris!" petis la patrino, "nomu sole la vojon, kaj mi retrovos ĝin!"

"Mi konas la vojon", respondis la virino en la nigra vestaĵo, "sed antaŭ ol mi nomos ĝin, 15vi devas kanti al mi ĉiujn kantetojn, kiujn vi kantis al via infaneto; mi ŝatas aŭdi ilin, mi jam ilin aŭdis antaŭe; mi estas la nokto, mi vidis vian ploron dum vi kantis!"

"Ĉiujn, ĉiujn mi kantos!" diris la patrino, "sed ne haltigu min, tiel ke mi povos ĝin atingi kaj trovi mian infaneton!"

Sed la nokto sidis mute kaj silente; tiam la patrino tordis siajn manojn, ŝi kantis kaj ploris, kaj estis multe da kantetoj sed ankoraŭ pli multe da larmoj, kaj jen diris la nokto: "Iru dekstren, en la malluman abiaron, tien la Morto forportis vian infaneton!"

Profunde en la arbaro la vojoj kruciĝis, kaj ŝi ne sciis plu kiun vojon ŝi devas sekvi; tie staris dornarbetaĵo, nek foliojn nek florojn ĝi havis, estis ja ankaŭ malvarma vintro, kaj sur la branĉoj pendis glaciaj kristaloj.

"Ĉu vi ne vidis la Morton preterpasi kun mia infaneto?"

"Certe", respondis la dornarbetaĵo, "sed mi ne diros, kiun vojon ĝi pasis, se vi ne antaŭe min varmigas ĉe via koro; mi mortas pro la frosto, mi tute glaciigas."

Kaj ŝi premis la dornarbetaĵon al sia koro, tiel firme, por ke ĝi bone varmiĝu, kaj la dornoj trapikis ŝian korpon, kaj grandaj sangogutoj elfluis, sed en la frosta vintronokto freŝaj verdaj folioj kaj floroj ekkreskis, tiel varme estis ĉe la koro de l' malĝoja patrino, kaj la dornarbetaĵo montris al ŝi la vojon kiun ŝi devas iri.

Ŝi foriris kaj atingis grandan lagon, kie troviĝis nek ŝipo, nek boato. La glacio ne estis sufiĉe forta por porti ŝin kaj la lago estis tiel profunda ke ŝi ne povus ĝin trapasi, tamen ŝi devis, por retrovi sian infaneton; jen ŝi kuŝiĝis por eltrinki la tutan akvon de la lago, kaj tio ja estas neebla al homo; sed la malĝoja patrino pensis, ke povus okazi ia miraklo.

"Ne, tio neniam prosperos al vi!" diris la lago, "pli bone estos se mi povos fari interkonsenton kun vi. Mi amas perlojn, kaj viaj okuloj estas la plej brilaj kiujn mi vidis. Ploru ĝis ili elfalos kaj donacu ilin al mi; se vi volas tion fari mi rekompence portos vin al la granda florujo, kie la Morto loĝas kaj prizorgas florojn kaj arbojn; ĉiu el ili estas homa vivo!"

"Ho! ĉion mi donos por veni al mia infaneto!" diris la ploranta patrino, kaj ŝi ploregis ankoraŭ pli multe kaj ŝiaj okuloj elfalis ĝis la fundo de l' lago kaj fariĝis du multekostaj perloj; sed la lago ŝin levis kvazaŭ ŝi estus sidanta en balancilo, kaj ŝi flugis al la kontraŭa bordo. Tie staris stranga domo, grandega; 17oni ne sciis, ĉu ĝi estas ia monto kun arbaroj kaj kavaĵoj, aŭ ĉu ĝi estas konstruita el ĉarpentaĵo, sed la malfeliĉa patrino ne povis tion vidi; ŝi ja estis plorinta ĝis la okuloj elfalis.

"Kie mi povos trovi la Morton, kiu foriris kun mia infaneto?" ŝi diris.

"Ĉi-tien ĝi ankoraŭ ne alvenis!" diris la maljuna sarkistino, kiu gardis la grandan flurujon de l' Morto.

"Kiamaniere do vi povis trovi ĉi-tiun lokon, kaj kiu vin helpis?"

"Dio min helpis!" ŝi respondis. "Li estas kompatema, kaj tia certe ankaŭ vi estos! Diru, kie mi povos trovi mian infaneton?"

"Mi ne scias," diris la sarkistino, "kaj vi ja ne povas vidi! Multe da floroj kaj arboj velkis ĉi-tiun nokton, la Morto baldaŭ venos por ilin replanti! Vi certe scias, ke ĉiu homo posedas sian propran vivarbon aŭ floron, kiu estas konforma al ĝia animo; ili aspektas kiel aliaj kreskaĵoj sed ili havas koron frapantan; infana koro povas ankaŭ frapi! Serĉu laŭ tiu informo, eble vi povos rekoni la korfrapon de via infaneto; sed kion vi volas doni al mi se mi diras nun, kion plie vi devas fari?"

"Mi ne posedas ion por fordoni", diris la 18malĝoja patrino, "sed mi estas preta iri por vi ĝis la fino de l' mondo."

"Bone, sed tie mi havas nenion por fari," diris la sarkistino; "donu al mi viajn longajn, nigrajn harplektojn; vi mem certe scias, ke ili estas belaj! Rekompence vi ricevos miajn blankajn, estas io almenaŭ!"

"Se vi nur postulas tion de mi," ŝi diris, "mi ĝin fordonos kun ĝojo!" Kaj ŝi donis al la sarkistino siajn belajn, nigrajn harplektojn kaj ricevis interŝanĝe la blankajn de l' maljunulino.

Tiam ili iris en la grandan florujojn de l' Morto, kie floroj kaj arboj strange interkreskis. Belaj hiacintoj staris sub vitrokloŝoj, kaj grandaj, fortegaj peonioj; oni vidis akvokreskaĵojn; unuj estis tute freŝaj, aliaj aspektis malsanete; limakoj rampis sur la folioj, kaj nigraj kankroj ĉirkaŭpremis la trunketojn: kreskis ankaŭ belegaj palmarboj, kverkoj kaj platanoj, kaj plie petroselo kaj floranta timiano; ĉiu arbo, ĉiu floro havis sian nomon, ĉiu estis la vivo de iu homo; la homo ankoraŭ estis vivanta, unu en Ĥinuĵo, alia en Grenlando, en ĉiuj lokoj de la mondo. Troviĝis altaj arboj kreskantaj en kuvoj malgrandaj; ili aspektis tute premitaj kaj estis pretaj por krevigi la kuvon; ankaŭ en multe 19da aliaj lokoj staris malsanaj floretoj en grasa tero, kun musko ĉirkaŭe kaj dorlote flegitaj. Sed la malĝoja patrino kliniĝis super ĉiu el la plej malgrandaj kreskaĵoj, kaj ŝi aŭdis, kiel frapas la homa koro interne de ili. Fine, fine el milionoj da kreskaĵetoj ŝi rekonis la koron de sia infaneto.

"Jen ĝi estas!" ŝi kriis etendante la manon super blua krokuseto, kiu tute kurbiĝis kontraŭ la tero, malsanete kaj lace.

"Ne tuŝu la floron!" diris la sarkistino, "sed atendu ĉi-tie, kaj kiam la Morto venos, vi zorgu ke ĝi ne forŝiru la kreskaĵon; minacu ĝin, ke vi forŝiros la aliajn florojn, tiam ĝi ektimiĝos; ĝi havas respondecon antaŭ Dio pri ili; neniu el ili povas esti forŝirata sen la permeso de Dio!"

Subite glacia vento trablovis la ĝardenon, kaj la blinda patrino sentis, ke estas la Morto, kiu venas.

"Kiamaniere vi povis trovi la vojon ĉi-tien?" ĝi demandis, "kiel vi povis alveni pli rapide ol mi?"

"Mi estas patrino!" ŝi diris. Kaj la Morto etendis sian longan brakon kontraŭ la malsaneta floreto, sed ŝi tenis siajn manojn ĉirkaŭ ĝi, tiel firme, kaj tamen zorgante por ne ektuŝi 20la foliojn. Sed la Morto blovis sur ŝiaj manoj, kaj ŝi sentis, ke estas akre, pli akre ol la plej malvarma vento, kaj senforte ŝiaj manoj subfalis.

"Vi ne povas ion fari kontraŭ mi!" diris la Morto. — "Sed la bona Dio povas!" ŝi respondis.

"Mi nur plenumas Lian volon!" diris la Morto. "Mi estas Lia ĝardenisto! Mi prenas ĉiujn Liajn florojn kaj arbojn kaj replantas ilin en la ĝardenon de l' Paradizo, en la nekonata lando, sed kiel ili tie kreskas, kaj kio ili fariĝos, mi ne povas rakonti!"

"Redonu al mi mian infaneton!" diris la patrino, kaj ŝi ploris kaj petegis; sed subite per ĉiu mano ŝi ekkaptis du belajn floretojn kiuj kreskis en la proksimeco, kaj ŝi kriis al la Morto: "Mi forŝiros ĉiujn viajn florojn, ĉar mia koro malesperas!"

"Ne tuŝetu ilin!" diris la Morto. "Vi diras, ke vi estas malfeliĉa, kaj nun vi volas, ke alia patrino fariĝu egale malfeliĉa kiel vi!"

"Alia patrino!" ŝi diris lasante la florojn en la sama momento.

"Jen estas viaj okuloj!" diris la Morto, "mi trovis ilin en la lago, ili tiel bele brilis: mi ne sciis ke estas la viaj, reprenu ilin, ili estas ankoraŭ pli brilaj ol antaŭe. Rigardu nun en 21la profundan puton tie; mi diros al vi la nomojn de la du floroj, kiujn vi volis forŝiri, kaj vi vidos ilian tutan estontecon, ilian homan vivon; vi vidos, kion vi volis detrui!"

Ŝi rigardis en la puton, kaj ŝi sentis sinceran feliĉon ĉar ŝi vidis, kiel la vivo de unu el ili fariĝas granda beno al la mondo: ho! kia feliĉo kaj ĝojo! Kaj ŝi vidis la vivon de l' alia; ĝi estas plena je mizero, doloro kaj teruro.

"Ambaŭ sortoj estas laŭ la volo de Dio!" diris la Morto.

"Kiu el ili estas la floro de l' mizero, kaj kiu estas tiu de l' feliĉo?" ŝi demandis.

"Tion mi ne diras!" respondis la Morto, "sed unu el ili estis la floro de via propra infaneto; la sorton, la estontecon de via infaneto, vi vidis!"

Terurigite la patrino kriis: "Ho, diru, kiu el ambaŭ estis mia infaneto! savu la senkulpan estaĵon, savu ĝin el la mizero! forprenu ĝin nur, mi petegas! Ho, konduku ĝin en la regnon de Dio! Forgesu mian ploron, mian doloron, ĉion, kion mi faris kaj diris!"

"Mi ne vin komprenas!" diris la Morto. "Ĉu vi volas, ke via infaneto revenu al vi, aŭ ĉu mi devas ĝin forpreni kun mi?"

22

Tiam la patrino tordis siajn manojn kaj genufleksante ŝi preĝis al Dio:

"Ne aŭskultu min, se mi postulis ion, kio estas kontraŭ Via volo! Vi sola estas superega kaj saĝa! Ne aŭskultu min, ne aŭskultu min!"

Kaj ŝi apogis la vizaĝon sur sia genuo, kaj la Morto kondukis la infaneton, for, for en la nekonatan landon.

La fajroŝtalo.

Soldato iris marŝante sur la vojo: unu, du! unu, du! li forvojaĝis kun tornistro sur la dorso kaj glavo ĉe la koksoj, ĉar li revenis de la milito, kaj nun li hejmen marŝis. Jen li renkontis maljunan sorĉistinon sur la vojo; ŝi estis treege abomeninda, ŝia sublipo pendis tute ĝis la brusto. Ŝi diris: "Bonan vesperon, soldato! kian belan glavon, kian grandan tornistron vi havas! Vi estas vera soldato, kaj nun vi ricevos tiom da mono kiom vi deziras!"

"Multan dankon al vi, sorĉistino!" la soldato respondis.

"Ĉu vi vidas la grandan arbon tie?" diris la sorĉistino montrante al li tiun arbon, kiu flanke staris ĉe la vojo. "Interne ĝi estas tute kava! Vi rampu nur ĝis la pinto, jen vi vidos truon kaj tra ĝi vi povos gliti ĝis vi venos profunde en la arbo. Mi ligas nun ŝnuregon ĉirkaŭ vi, kaj tiel mi povos suprentiri vin tuj kiam vi min vokos."

"Sed kion mi devas fari en la arbo?" demandis la soldato.

"Alporti monon!" la sorĉistino diris, "ĉar kiam vi venos al la fundo de l' arbo, vi troviĝos en granda subtera ĉambro; ĝi estas tute luma, ĉar pli ol cent lampoj tie brilas. Jen vi vidos tri pordojn, vi povos ilin malfermi, ĉar estas ŝlosilo en ĉiu seruro. Irante en la unuan ĉambreton vi vidos grandan keston meze de la planko; sur la kesto sidas hundo, ĝi havas okulojn tiel grandajn kiel te-tasoj, sed tio ne devas vin timigi! Mi donas al vi mian bluan antaŭtukon, vi povos ĝin malfaldi sur la planko: tiam vi rapide iru al la hundo, forprenu ĝin, metu ĝin sur la antaŭtukon, malfermu la keston kaj prenu tiom da moneroj kiom vi volas. Ili estas ĉiuj el kupro; sed se vi preferas havi arĝentajn, vi nur bezonas iri en la duan ĉambreton; tie vi vidos ankaŭ hundon; ĝi havas okulojn tiel grandajn kiel mueleja rado, sed tio ne devas vin timigi, vi metu ĝin trankvile sur la antaŭtukon kaj prenu el la mono! Sed se vi volas oran monon, vi povos ankaŭ tian havi, kaj tiel multe kiel vi povas porti; vi nur bezonas iri en la trian ĉambreton. Sed la hundo, kiu tie sidas sur la kesto, havas du okulojn tiel grandajn kiel la "Ronda Turo" en Kopenhago. 25 Ĝi estas vera hundo, vi povas pensi, sed tio ne devas vin timigi! Vi nur metu ĝin sur la antaŭtukon, tiam ĝi tute nenion malbonan faros al vi, kaj prenu el la kesto tiom da oro kiom vi volas!"

"Estas efektive bonege!" diris la soldato. "Sed kion mi devas doni al vi, sorĉistino? Ĉar certe vi ankaŭ volas ion havi, mi pensas!"

"Ne!" la sorĉistino diris, "eĉ ne iun monerecon mi deziras! Nur prenu por mi malnovan fajroŝtalon, kiun forgesis mia avino, kiam ŝi laste tie estis!"

"Nu, donu al mi la ŝnuregon!" diris la soldato.

"Jen ĝi estas," respondis la sorĉistino, "kaj jen mia blua antaŭtuko!"

Nun la soldato suprenrampis la arbon, glitis tra la truo kaj tuj poste li staris en la granda subtera ĉambro, kie brilis pli ol cent lampoj.

Li malfermis la unuan pordon. Hu! jen li vidis la hundon kun okuloj tiel grandaj kiel te-tasoj, kaj ĝi strange lin rigardis. "Vi estas bela bubo!" diris la soldato, kaj li metis la hundon sur la tukon de l' sorĉistino, prenis tiom da kupraj moneretoj, kiom li povis havi en la poŝo, fermis la keston, remetis la hundon sur ĝin kaj iris en la duan ĉambron. Eja! Jen la hundo kun okuloj tiel grandaj kiel mueleja rado!

"Ne rigardu min tiel persiste, mi konsilas al vi!" diris la soldato, "viaj okuloj povus doloriĝi!" kaj tuj li metis la hundon sur la tukon de l' sorĉistino, sed ekvidante la arĝentajn moneretojn en la kesto, li forĵetis la kuprajn, kiujn li jam havis, kaj rapide li plenigis sian poŝon kaj tornistron je pura arĝento. Fine li iris en la trian ĉambreton. Hu! — Estis terure! La hundo tie efektive havis du okulojn tiel grandajn kiel la "Ronda Turo", kaj en la kapo ili turniĝis kvazaŭ radoj!

"Bonan vesperon!" diris la soldato kaj li salutis militiste per la mano, ĉar tian hundon li neniam antaŭe estis vidinta; sed post kiam li iomete ĝin rigardis, li pensis ke povas esti sufiĉe. Li metis la hundon sur la plankon, kaj malfermis la keston. Ho! granda Dio! kian amason da mono! Li ja povus aĉeti la tutan urbon Kopenhago, la sukerajn porkidojn de l' kukistinoj, ĉiujn stansoldatojn, vipojn kaj ludĉevalojn de la tuta mondo. Jen efektive multego da mono! La soldato nun forĵetis ĉiujn arĝentajn monerojn, kiujn li havis en la poŝo kaj tornistro, kaj anstataŭe li prenis oron, 27 kaj plenigis la poŝojn, la tornistron, la ĉapon kaj la botojn, tiel ke li preskaŭ ne povis iri: Nun li havis monon! La hundon li remetis sur la keston, la pordon li brue fermis kaj kriis tra la arbo:

"Nun, suprentiru min, sorĉistino!"

"Ĉu vi havas la fajroŝtalon?" ŝi demandis. "Ne," li diris, "estas bone, ke vi memorigas min pri tio; mi tute ĝin forgesis!" Kaj li denove iris en la fundon de l' arbo kaj prenis la ŝtalon. La sorĉistino suprentiris lin, kaj jen li ree staris sur la vojo kun poŝoj, tornistro, ĉapo kaj botoj tute plenaj je mono. "Kion vi intencas fari per la fajroŝtalo?" demandis la soldato.

"Tio ne koncernas vin!" respondis la sorĉistino, "nun vi ja ricevis la monon! Donu vi nur al mi la fajroŝtalon!"

"Tute ne!" la soldato diris, "rakontu tuj por kio vi intencas uzi ĝin, alie mi eltiras mian glavon kaj detranĉas vian kapon!"

"Ne, mi ne volas ion diri!" estis la respondo de l' sorĉistino.

Tiam la soldato detranĉis ŝian kapon, kaj jen ŝi kuŝis! Sed la monon li kolektis en ŝia antaŭtuko, prenis la pakaĵon sur la dorso, metis la fajroŝtalon en sian poŝon kaj marŝis rekte al la urbo.

28

Estis belega urbo, kaj en la plej komforta gastejo li loĝiĝis; tie li havis la plej bonajn ĉambrojn kaj delikatan manĝaĵon, ĉar nun li estis riĉa, li ja posedis tiom da mono.

La servisto, kiu devis ciri liajn botojn, pensis, ke estas strange, ke tia riĉa sinjoro havas nur tiel mirinde malnovajn botojn, sed la soldato ankoraŭ ne estis aĉetinta al si novajn; la proksiman tagon li ricevis bonajn botojn kaj veston elegantan. Nun la soldato estis vere nobla sinjoro, kaj oni rakontis al li pri ĉiuj belaj aferoj de la urbo, pri la reĝo kaj lia ĉarma filino, la princino.

"Kie oni povas vidi ŝin?" demandis la soldato.

"Oni tute ne povas vidi ŝin!" ili ĉiuj diris, "ŝi loĝas en granda kupropalaco, kiu estas ĉirkaŭata de multaj turoj kaj muroj! Neniu krom la reĝo povas iri en la palacon, ĉar estas antaŭdirite, ke ŝi iam edziniĝos kun tute simpla soldato, kaj tion la reĝo ne volas!"

"Mi tre dezirus vidi ŝin!" pensis la soldato, sed li ja ne povis havi la permeson.

Li komencis nun tre gajan vivon, ofte li vizitis la teatron, veturis en la ĝardeno de la reĝo kaj donis multe da mono al malriĉaj homoj, kaj tio estis bone farita! Li memoris de antaŭaj 29tagoj, kiel mizere estas ne posedi monerecon! — Li ja estis riĉa, portis belajn vestojn kaj havis baldaŭ multajn amikojn, kaj ili ĉiuj diris, ke li estas ĉarma viro, vere nobla Moŝto, kaj tion la soldato tre plezure aŭdis. Sed ĉar li ĉiun tagon elspezis multe da mono sen havi ian enspezon, li fine nur posedis du denarojn, kaj li devis forlasi la belan apartamenton, kie li havis sian loĝejon, kaj loĝiĝi en malvasta ĉambreto rekte sub la tegmento. Tie li mem devis purigi siajn botojn kaj fliki ilin per kudrilo, kaj neniu el la amikoj vizitis lin, ĉar la ŝtuparo estis al ili tro alta.

Estis tute malluma vespero, kaj li povis eĉ ne aĉeti kandelon, sed tiam li memoris, ke en la fajroŝtalo, kiun li prenis en la kava arbo, kuŝas peceto de kandelo. Li ekprenis la fajroŝtalon kun la kandelppeceto, sed en la sama momento kiam li provis ekflamigi kaj fajreroj flugis el la siliketo, la pordo subite malfermiĝis, kaj tiu hundo kiu havis okulojn tiel grandajn kiel te-tasoj kaj kiun li estis vidinta malsupre en la arbo, staris antaŭ li kaj diris: "Kion ordonas mia majstro?"

"Kion mi vidas!" diris la soldato, "estas ja stranga fajroŝtalo; ĉu mi tiel povos havi kion mi deziras? Nu, bone, havigu al mi iom da 30mono," li diris al la hundo, — kaj tuj ĝi foriĝis! Baldaŭ ĝi revenis, tenante en la buŝo grandan sakon da mono.

Nun la soldato komprenis, kian bonegan fajroŝtalon li posedas. Se li unufoje flamigos, alvenos la hundo, kiu sidis sur la kesto kun kupromono; se li dufoje flamigos, alvenos tiu hundo, kiu havis arĝenton, kaj se li trifoje flamigos, alvenos tiu, kiu havis puran oron. — Nun la soldato reloĝiĝis en la bela apartamento, denove li portis elegantajn vestojn, kaj tuj la amikoj lin rekonis kaj tiel multe lin ŝatadis. —

Iam li pensis: Estas vere stranga afero ke oni ne povas vidi la principinon! Ili diras, ke ŝi estas tiel belega! Sed kion povas tio helpi, se ŝi devas ĉiam sidi en la granda kupropalaco kun la multaj turoj. — Ĉu mi do tute ne povos vidi ŝin? — Nu, kie estas mia fajroŝtalo? Li flamigis per ĝi, kaj tuj alvenis la hundo kiu havis okulojn tiel grandajn kiel te-tasoj.

"Estas meze de la nokto," diris la soldato, "sed mi tre sincere deziras vidi la principinon, nur unu minuton!"

Tuj la hundo kuregis tra la pordo kaj antaŭ ol la soldato povis pripensi, ĝi revenis kun la principino; ŝi sidis dormante sur la dorso de l' hundo, kaj ŝi estis tiel belega, ke ĉiu povus vidi ke ŝi estas vera principino; la soldato kisis ŝin, li tute ne povis sin deteni, ĉar li estis vera soldato.

La hundo forkuris kun la principino, sed kiam fariĝis mateno kaj la gereĝoj trinkis teon, la principino diris, ke ŝi nokte havis tiel strangan sonĝon pri hundo kaj soldato. Ŝi rajdis sur la hundo, kaj la soldato kisis ŝin.

"Estas ja bela historio, mi devas konfesi!" diris la reĝino, kaj la sekvantan nokton maljuna korteganino devis sendorme pasigi apud la lito de l' principino por vidi, ĉu reale estus sonĝo aŭ kio povus alie esti.

La soldato terure sopiris je la belega principino, kaj denove la hundo venis dum la nokto, forprenis ŝin el la lito kaj kuris tiel rapide kiel eble, sed la maljuna korteganino surmetis grandajn botojn kaj egale rapide ŝi kuradis post ili. Vidante ke ili malaperas

en grandan domon ŝi pensis: Nun mi scias, kie estas la loko! kaj per kredo ŝi desegnis grandan krucon sur la pordego. Tiam ŝi iris domen kaj kuŝiĝis, kaj la hundo ankaŭ revenis kun la princino, sed kiam ĝi vidis, ke granda kruco estas desegnita sur la pordego de l' domo kie loĝas la soldato, ĝi mem prenis kreon kaj desegnis krucojn sur ĉiuj pordegoj de la urbo, 32kaj tio estis saĝe farita, ĉar nun la korteganino ja ne povos trovi la ĝustan pordegon.

Frue, matene venis la reĝo kaj reĝino, la maljuna korteganino kaj la oficiroj por vidi la domon, kien la princino estis alportita.

"Jen ĝi estas!" diris la reĝo, kiam li vidis unu pordegon kun kruco. "Ne, — estas tie, edzeto!" diris la reĝino, vidante alian kun kruco.

"Sed jen estas unu, kaj ankaŭ jen unu!" diris la ceteraj; kien ajn ili rigardis, ili trovis krucojn sur la pordegoj: Tiam ili bone povis kompreni, ke estas tute senutile plie serĉi.

Tamen la reĝino estis saĝa virino, kiu povis aranĝi multe da aferoj. Ŝi prenis sian oran tondilon, distranĉis grandan silkotukon kaj kudris el ĝi belan saketon; la saketon ŝi plenigis je greneretoj, ŝi fiksis ĝin sur la dorso de l' princino, kaj kiam tio estis preta, ŝi faris tre malgrandan truon en la saketo, tiel ke la greneretoj povos elŝutiĝi la tutan vojon, kiun sekvas la princino.

En la nokto la hundo revenis, prenis la princinon sur la dorso kaj kuregis kun ŝi al la soldato, kiu tiom amis ŝin kaj deziris, ke li estu princo por edziĝi kun ŝi.

La hundo tute ne rimarkis ke elŝutiĝis la greneretoj sur la vojo, de l' palaco kaj rekte 33ĝis la fenestro de la soldato. Je la mateno la gereĝoj facile vidis, kien la princino estis alportita, kaj ili ekkaptis la soldaton kaj metis lin en malliberejon.

Jen li sidis. Hu! kiel mallume kaj enuige estis tie, kaj tiam oni diris al li: "Morgaŭ vi estos pendigata!" Ne estis agrable al li tion aŭdi, kaj sian fajroŝtalon li estis forgesinta en la gastejo. Matene, inter la ferstangoj de l' fenestreto, li povis vidi kiel rapidis la popolo el la urbo por ĉeesti la ekzekutadon. Li aŭdis la tamburadon kaj vidis marŝi la soldatojn. Ĉiuj homoj forkuris; estis inter ili ankaŭ ŝuistlernanto kun leda antaŭtuko kaj pantofloj; li tiel rapide troitis, ke li perdis unu pantoflon, kiu falante trafis la muron, post kiu sidis la soldato, rigardante el la fenestreto!

"Hej, ŝuisteto! vi ne bezonas tiel rapidegi," diris la soldato, "ĉar nenio okazos antaŭ ol alvenos mi; sed, aŭskultu, faru al mi serveton: iru en mian loĝejon kaj alportu ĉi-tien mian fajroŝtalon, vi havos rekompence dek monerojn! Sed — rapidegu!" La ŝuisteto tre volonte deziris la promesitan rekompencon, li rapidege kuris por alporti la fajroŝtalon, donis ĝin al la soldato, kaj — aŭskultu bone kio nun okazas!

Ekster la urbo estis starigita granda pendigilo; ĉirkaŭe atendis la soldatoj kaj multaj miloj da rigardantoj. La reĝo kaj la reĝino sidis sur belega trono antaŭ la juĝisto kaj la tuta konsilantaro.

La soldato jam staris supre sur la eŝafodo, sed kiam la ekzekutisto komencis meti la pendŝnuregon ĉirkaŭ lia kolo, li diris, ke oni ja ĉiam permesas al krimulo esprimi modestan deziron kaj ĝin plenumi. Li treege dezirus fumi pipon da tabako; estus ja la lasta pipo, kiun li povus fumi en ĉi-tiu mondo.

Tion la reĝo ne volis rifuzi, kaj jen la soldato prenis sian fajroŝtalon kaj flamigis: unu, du, tri! tuj alvenis ĉiuj tri hundoj, unu kun okuloj tiel grandaj kiel te-tasoj, unu kun okuloj kiel mueleja rado kaj unu kun okuloj tiel grandaj kiel la "Ronda Turo"!

"Vi helpu min rapide, por ke mi ne estu pendigata!" diris la soldato, kaj tuj la hundoj furioze saltegis kontraŭ la juĝisto kaj la tuta konsilantaro, unu estas ekprenita ĉe la piedoj, alia ĉe la nazo, kaj ĉiuj ĵetitaj alten en la aero, kaj tute frakasitaj ili disfalis sur la tero.

"Mi ne volas! Mi ne volas!" kriis la reĝo, sed la plej granda hundo prenis lin kaj la reĝinon kaj ilin ĵetis post la ceteraj; eĉ la 35 soldatoj teruriĝis kaj la popolo kriegadis: "Kara soldateto, vi fariĝu nia reĝo kaj edziĝu kun la belega princino!" Tiam ili sidigis la soldaton en la kaleŝo de l' reĝo, la tri hundoj gaje dancis antaŭ ĝi, ili kriis Hura! kaj la knaboj fingrefajfis, kaj ĉiuj soldatoj salutis. Sed la princino forlasis la kupropalacon kaj fariĝis reĝino. La edziĝa festo daŭris ok tagojn, kaj la hundoj ĉeestis la festenadon, kaj ili faris grandajn okulojn.

La princino sur pizo.

Estis iam princo, kaj li deziris edziĝi kun princino; sed ŝi devus esti vera princino. Por trovi tian principinon li faris multajn kaj longajn vojaĝojn en la tuta mondo; sed ĉie, kien li venis, li renkontis jen unu jen alian malfacilaĵon. Ekzistis certe sufiĉe da principinoj, sed ĉu ili estas veraj principinoj, li ne povis tuj ekscii; ĉe ĉiu el ili li trovis ion malveran. Fine li revenis domen, kaj li tiam estis tre ĉagrena, kion oni povos bone kompreni, ĉar lia plej sincera deziro estis ja edziĝi kun vera princino.

Ian vesperon la vetero fariĝis treege malbela; fulmadis kaj tondris kaj senĉese falis de la ĉielo pluvegoj. Nun iu frapis la pordegon de la kastelo, kaj la maljuna reĝo iris por malfermi.

Ekster la pordego staris princino. Sed, ho ĉielo, kian aspekton ŝi havis! De ŝiaj haroj kaj de la vestaĵo gutegis la akvo; ĝi tute trafluis ŝiajn ŝuojn kaj elgutadis el la kalkanumo, kaj dum ŝi staris ĉi-tie en la pluvego ŝi diris, ke ŝi estas vera princino.

37

Nu, ĉi-tion ni facile ekscios! pensis la maljuna reĝino; ŝi nenion diris sed iris en la dormoĉambron, kaj forpreninte la tutan litaĵon ŝi metis pizon sur la fundon de la lito. Ŝi prenis nun dudek matracojn, metis ilin sur la pizon, kaj sur la matracojn ŝi plie metis dudek kusenegojn, faritajn el la plej mola lanugo, kiu ekzistas.

En ĉi-tiu lito la princino devis dormi nokte. Je l' mateno oni ŝin demandis, kiel ŝi dormis.

"Ho, malbonege!" la princino respondis, "mi preskaŭ ne ripoziĝis la tutan nokton, kaj mi ne komprenas, kio troviĝis en la lito."

"Mi kuŝis sur ia malmolaĵo, kaj mia tuta korpo fariĝis bruna kaj blua. Estas tre malagraba kaj stranga okazo!"

Nun oni povis kun certeco scii, ke ŝi estas vera princino, ĉar la pizon ŝi estis eksentinta eĉ malgraŭ la dudek matracoj kaj la dudek kusenegoj kun la plej mola lanugo kiu ekzistas. Neniu ol vera princino povus posedi tian mirindan sentemecon!

Post ĉi-tio la princo edziĝis kun ŝi, ĉar li ja sciis, ke lia edzino estas vera princino, kaj la pizon oni enmetis en la muzeon de la reĝo. Tie ĝi troviĝas ankoraŭ nun se neniu ĝin forŝtelis.

38

La knabineto kun la alumetoj.

Estis terure malvarme; neĝis kaj komencis fariĝi malluma vespero; estis la lasta vespero de l' jaro, novjara vespero.

En ĉi-tiu malvarmo, en ĉi-tiu mallumo iris en la strato malriĉa knabineto kun nuda kapo kaj nudaj piedoj; ŝi ja portis pantoflojn, kiam ŝi forlasis la domon, sed por kio povus ili helpi! Estis tre grandaj pantofloj, laste ŝia patrino uzis ilin, tiel grandaj ili estis. Jen rapidege preterpasis du veturiloj, kaj kurante trans la strato, la knabineto perdis la pantoflojn. Unu pantoflon ŝi ne povis trovi, kaj knabo forkuris kun la alia; li diris ke li povos uzi ĝin kiel lulilon, se li mem havos iam infanetojn. Tie iris nun la knabineto kun la nudaj piedetoj, ruĝaj kaj bluaj pro malvarmo; en la malnova

antaŭtuko ŝi havis amaseton da alumetoj kaj paketon ŝi portis en la mano; la tutan tagon neniŭ aĉetis alumetojn de ŝi, nek iu donacis al ŝi monereton; malsata kaj suferante de l' frosto ŝi iris kun malĝoja mieno tra la stratoj, kompatinda 39knabineto! La neĝfloketoj falis sur ŝiajn longajn, blondajn harojn, kiuj ĉarme bukligis ĉirkaŭ la nuko, sed pri ĉi-tiu ornamo ŝi tute ne pensis. El ĉiuj fenestroj brilis la kandeloj, kaj en la strato odoris bonege ansera rostaĵo; estis novjara vespero, kaj pri tio ŝi la tutan tempon pensis.

En anguleto inter du domoj — unu staris iomete pli antaŭe en la strato ol la alia — tie ŝi sidigis metante la piedetojn sub sin; sed nun ŝi sentis la froston ankoraŭ pli multe, kaj domen ŝi ne kuraĝis iri, ĉar ŝi ja neniujn alumetojn vendis, nenian monereton ŝi ricevis; ŝia patro batus ŝin sendube, kaj estis malvarme ankaŭ dome; tie la tegmento kuŝis preskaŭ sur la kapo, kaj la vento fajfe muĝis tra la ĉambreto, kvankam oni ŝtopis per pajlo kaj ĉifonoj la plej grandajn fendojn.

La manetoj de la knabineto estis preskaŭ tute senvivaj pro malvarmo. Ho! alumeto povus fari bone al ŝi. Se ŝi nur kuraĝus eltiri unu solan el la paketo, ekbruligi ĝin kontraŭ la muro kaj varmigi la fingretojn ĉe la flamo! Ŝi eltiris unu, ritŝ! Kiel ĝi ŝprucetis, kiel ĝi brulis! Estis hela, varma flamo — kvazaŭ kandleto, kiam ŝi tenis la maneton ĉirkaŭ ĝi! Kia mirinda lumado! Al la knabineto subite ŝajnis, kvazaŭ 40ŝi estus sidanta antaŭ granda ferkameno ornamita per brilaj globetoj kaj cilindro el latuno. La fajro tie brulas gaje, ĝi varmigas tiel bone; sed! — kio estas do tio! La knabineto jam proksimigis la piedetojn al ĝi por varmigi ilin ankaŭ — — sed ho ve! estingiĝis la flamo, la kameno malaperis, kaj ŝi sidis tie kun peceto de elbrulinta alumeto en la mano.

Ŝi ekbruligis alian alumeton, ĝi brulis, ĝi lumadis, kaj en la loko kie la radioj falis sur la domon, la muro fariĝis diafana kiel krepo; ŝi rigardis en la salonon, kie staris tablo kovrita de brilblanka tuko, kun bela porcelanaĵo, kaj bonege vaporetis ansera rostaĵo kun pomoj kaj sekprunoj; kaj jen tio, kio estis ankoraŭ pli belega: la ansero saltis el la plado, skuiĝante ĝi iris sur la planko, portante en la dorso tranĉilon kaj forketon; ĝi venis rekte al la knabineto; — sed tiam estingiĝis la alumeto, kaj nur la dika, malvarma muro restis videbla.

La knabineto ekbruligis alian alumeton. Jen ŝi sidis sub la plej belega Kristnaska arbo; ĝi estis ankoraŭ pli granda kaj pli riĉe ornamita ol tiu, kiun ŝi vidis tra la vitra pordo ĉe la riĉa komercisto, la lastan Kristnaskan feston. Miloj da kandeloj brulis sur la verdaj branĉoj, kaj multkoloraj bildoj kiel tiuj, kiuj ornamas 41la butikfenestrojn, ŝin rigardis. La knabineto etendis ambaŭ manetojn; — tiam estingiĝis la alumeto; la multaj kandletoj de l' Kristnaska arbo leviĝis pli kaj pli alten; ŝi vidis, ke ili estas nun brilaj steloj; unu stelo falis lasante sur la ĉielo longan fajrostrion.

"En ĉi-tiu momento mortas iu," diris la knabineto, ĉar ŝia mortinta avino, la sola persono, kiu faris bonon al ŝi, ofte diris: "Kiam stelo falas, animo flugas supren, al Dio!"

Ankoraŭ unu fojon la knabineto ekbruligis alumeton kontraŭ la muro; ĝi briladis kaj lumis ĉirkaŭe, kaj en la lumado ŝi vidis sian avinon, tiel hela, tiel belega kaj dolĉa.

"Avino!" kriis la knabineto, "ho avino, prenu min kun vi! Mi scias, ke vi malaperos for de mi, kiam la alumeto estingiĝos, for de mi kiel la varma kameno, kiel la belega ansera rostaĵo, kaj la granda, dolĉa Kristnaska-arbo!" — kaj rapidege ŝi ekbruligis ĉiujn alumetojn, kiuj restis en la paketo. Ŝi volis nun firme teni la avinon, kaj la alumetoj lumis kun tia brilo, ke fariĝis multe pli lume ol ĉe la klara tago. Neniam la avino estis tiel belega, tiel granda; ŝi levis la knabineton supren sur sian brakon, kaj en brilo kaj ĝojego ili forflugis, 42tiel alten, tiel alten, kaj tie estis nenia malvarmo, nenia malsato, nenia timo; — ili estis ĉe Dio.

Sed je la malvarma, frua matenhoro, en la anguleto ĉe la domo, sidis la knabineto kun ruĝaj vangoj kaj buŝeto ridanta: — senviva ŝi estis, mortigita de l' frosto la lastan vesperon de l' malnova jaro. La novjara mateno ekbrilis super la mortinta knabineto, kiu sidis tie kun siaj alumetoj, el kiuj unu paketo estis preskaŭ elbruligita. "Ŝi volis sin varmigi," oni diris. Sed neniuj sciis, kiom da belaĵoj ŝi vidis, nek en kia brilo ŝi eniris kun sia kara avino en la ĝojegon de la Nova Jaro.

Enhavo.

	paĝo
<u>Hans Christian Andersen</u>	3
<u>La brava stansoldato</u>	5
<u>Rakonto pri patrino</u>	13
<u>La fajroŝtalo</u>	23
<u>La princino sur pizo</u>	36
<u>La knabineto kun la alumetoj</u>	38

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin SW., Lindenstrasse 18/19.



Fundamento de Esperanto:

Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola,

bindita 1,30

Eldonoj Greka, Hispana, Itala, Rumana,

ĉiu volumo broŝurita 0,50

Oni vendas aparte:

Ekzercaro (kvinlingva) 0,30

Universala Vortaro (kvinlingva) 0,45

Wörterbuch Deutsch-Esperanto

bindita 1,25

broŝurita 1,—

Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch

bindita 0,65

broŝurita 0,50

Fundamenta Krestomatio

bindita 1,80

broŝurita 1,40

Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière 0,55

Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare 0,80

Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe

bindita 1,15

broŝurita 0,90

La Predikanto, libro el "La Biblio" 0,35

La Psalmaro, libro el "La Biblio" 1,10

La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller 0,90

La Revizoro , komedio en kvin aktoj de Gogol	0,70
La Sentencoj de Salomono , libro el "La Biblio"	0,70
La Virineto de Maro , fabelo de Andersen, kun ilustraĵoj de Hilda May Brodie	0,70

Verkoj de Kabe (D^{ro} K. Bein).



Elektitaj Fabeloj de Fratoj Grimm , trad. el germana lingvo	0,75
Unua Legolibro , gradigitaj legaĵoj kun frazlibro kaj modeloj de leteroj	0,75
La fundo de l' mizero , de Sieroŝevski	0,35
La interrompita Kanto , trad. el Orzeszko	0,35
Internacia Krestomatio	0,50
Pola Antologio	0,85
La Faraono , trad. el Prus, tri volumoj	po 0,90
Versaĵoj en Prozo , trad. el Turgenjev	0,40
Bona Sinjorino , trad. el Orzeszko (Esperanta Biblioteko Internacia)	0,10

Kolekto de "La Revuo".

INSTRUA FAKO.



Esperanta Sintakso , laŭ verkoj de D ^{ro} Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. En Esperanto verkita de Paul Fruictier	0,60
Konkordanco de Ekzercaro , ellaboris A. E. Wackrill	0,50
Frazaro , de H. de Coppet	0,50
Du mil novaj vortoj ĉerpitaj el la verkaro de D ^{ro} Zamenhof, netroveblaj en Universala Vortaro, ellaboris P. Boulet	0,70

Kolekto de "La Revuo".

LITERATURA FAKO.



Angla lingvo sen profesoro , unuakta komedio de Tristan Bernard, tradukita de Gaston Moch	0,50
Aspazio , tragedio en kvin aktoj, de A. Svjentoĥovski, tradukita de D ^{ro} Leono Zamenhof	1,—
Bukedo , artikoloj pri literaturaj kaj beletristikaj demandoj, de Ch. Lambert	0,90
Imenlago , novelo de Theodor Storm, tradukita el la germana lingvo de Alfred Bader	0,35
La Faraono , romano de Prus, tradukita de D ^{ro} Bein. Tri volumoj	(ĉiu) 0,90
La Reĝo de la montoj , de Ed. About, tradukita de G. Moch. Ilustr. de Doré	1,55
La Rompantoj , kvin monologoj kun ilustraĵoj. Originale verkitaj de Frederiko Puĵula-Valjes	0,50
La Tria , Memoraĵoj pri la tria Kongreso, ilustr.	0,75
Laŭroj , kolekto de verkoj premiitaj en la unua literatura konkurso de "La Revuo"	0,90
Libro de l' Humoraĵo , originale verkita de P. de Lengyel	1,—
Makbeto , dramo en kvin aktoj de Shakespeare, tradukita de D ^{ro} H. Lambert	0,90

Literaturaĵoj.



Sub la neĝo . Taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro de J. J. Porchat, esperantigis J. Borel	0,50
Solvo de la problemo de lingvo internacia , de ** kun germana traduko de Profesoro Christaller	0,40
Tri unuaktaj Komedioj : "La malfeliĉuloj" de A. v. Kotzebue — "Tie ĉi oni parolas Esperante" de T. Williams — "La Renkonto" de M. Hankel	0,40
Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri? de Prof. L. Couturat	0,10
Advokato Patelin . Triakta proza komedio, de Brueys kaj Palaprat, tradukita de M.-J. Evrot	0,35
L' Avarulo , de Molière, tradukita de S. Meyer	0,35
Cikado ĉe Formikoj , Unuakta komedio de Labiche kaj Legouvé	0,30
Ĉu li? Romano originale verkita de D ^{ro} Valienne	1,75

Diversaĵoj. Rakontetoj tradukitaj de Lallemand kaj Beau	0,60
Don Juan , de Molière, trad. de D ^{ro} Boirac, rektoro de l' universitato de Dijon (Versaĵoj)	0,70
Elektitaj fabloj de La Fontaine , esperantigitaj de G. Vaillant	0,35
Eneido de Virgilio , tradukita de D ^{ro} Vallienne. (Versaĵoj)	1,30
Esperantaj prozaĵoj "kolekto da tekstoj de plej bonaj aŭtoroj"	1,—
Kastelo de Prelongo , granda romano originale verkita de D ^{ro} Vallienne	1,75
Kiel ni plibeligos la vivon , originale verkita de Saĝulo	0,25
Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia, ellaboris A. Grabowski	0,85
La kvar Evangelioj , kunigitaj en unua rakonto kaj tradukitaj de la pastro R. Laisney	0,75
Monadologio de Leibniz , traduko de D ^{ro} Boirac, rektoro de l' universitato de Dijon	0,25
Libro de l' Humoraĵo , originale verkita de Paul de Lengyel, nova eldono	1,—
La Nevo kiel Onklo , komedio en 3 aktoj de Schiller, trad. de Stewart	0,50
Vojaĝo interne de mia ĉambro , de X. de Maistre, tradukita de S. Meyer	0,35
Akvo dormanta , sceno el la Meksikana vivado, trad. Lotus	0,25
Aventuroj de l' lasta Abenceraĝo , de Chateaubriand, trad. de R. Deshays	0,25
Du rakontoj de D. de Rothau. La blanka Kastelo. Esperantista hotelo	0,50
Du slavaj rakontoj. La Rakonto de Filip Vasilîĉ de M. Gorki. Ĉu li venas de J. Vazov	0,30
Edziĝo kontraŭvola , unuakta Komedio de Molière, trad. de Dufeutrel	0,30
El la historio de Esperanto (Letero pri la deveno de Esperanto). Paroladoj de D ^{ro} Zamenhof kaj D ^{ro} Bein (Kabe) en la Boulogna kongreso	0,15
En Svislando , kvin rakontoj el verkoj de svisaj aŭtoroj elektis kaj trad. E. Ramo	1,35
Esperantaj Perleroj el "Lingvo Internacia" . Aforismoj, Proverboj, Poezioj, 3 Serioj	po 0,15
Eŭgenino Grandet , scenoj de la vivo de provinco de H. de Balzac, trad. E. Gasse	0,75

Ĵurnaloj tute en Esperanto.

Oficiala Gazeto Esperantista: Organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. 51 Rue de Clichy, Paris. 2,— Sm.

Dia regno: *Mühlheim (Rhein)*. P. Hübner, Friedrich-Wilhelm-Strasse 66. 0,90 Sm.

- Esperanto:** *Genève* (Svis.), oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, duonmonata. H. Hodler, 8, rue Bovy-Lysberg. 1,90 Sm.
- Esperanta Ligilo:** *Paris (V)* (Franc.), monata organo en reliefpunktoj por blinduloj. Ĉefredaktoro: Th. Cart, 12. rue Soufflot. 1,20 Sm.
- Espero Katolika:** *Paris*, monata. Administracio 23 rue Joubert, Paris. Redakcio Claudius Colas, 10 rue Béranger, Paris. 2,— Sm.
- Espero Pacifista:** *Neuilly-sur-Seine* (Franc.), monata organo de "Pacifisto". G. Moch, 26, rue de Chartres. 2,— Sm.
- Hispana Revuo:** *Madrid* (Hisp.), ilustrata monata revuo. Josefo Menendez, Strato Echegary 17, I. 1,30 Sm.
- Internacia Pedagogia Revuo:** *Bystrice-Hostyn*, Moravio, Aŭstrio. Theodor Ĉejka. Membroj 1,— Sm. Nemembroj 1,50 Sm.
- Internacia Scienca Revuo:** *Genève* (Svis.), monata R. de Saussure, 8, rue de Bovy-Lysberg. 2,75 Sm.
- Internacia Socia Revuo:** *Paris (III)* (Franc.), monata. R. Louis (Maison Commune), 49 Rue de Bretagne. 1,40 Sm.
- Juna Esperantisto:** *Paris* (Franc.), monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperantolernantoj. Presa Esperant. Societo, 33 rue Lacépède. 1,— Sm.
- La Bela Mondo:** *Dresden* (Germ.), ilustrata monata gazeto. F. Emil Boden, Dresden-A., Bismarckplatz 12. 3,— Sm.
- La Revuo:** *Paris* (Franc.), internacia monata literatura gazeto, 48 paĝoj. Administracio: Librejo Hachette & Co., 79, Boulevard St. Germain. 2,75 Sm. Por Germanujo kaj Aŭstrujo ĉe **Esperanto Verlag Möller & Borel**, Berlin S.W. 68, Lindenstr. 18-19.
- La Spritulo:** *Leipzig* (Germ.), monata gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro. Richard Bresch, Körnerstrasse 31, Leipzig. 1,20 Sm.
- Lingvo Internacia:** *Paris* (Franc.), monata organo. Kun aldono literatura. Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède. 3,— Sm.
- Voĉo de Kuracistoj:** *Lwów* (Galicio). D^{ro} Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6. 1,50 Sm.

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H., Berlin SW., Lindenstr. 18/19.

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK FABELOJ DE ANDERSEN ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including

paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE